programo. ³⁰⁾ pleje akcentis tiun ĉi programon. ³¹⁾ Lepŝi neĝ baptoĉona- con. ³²⁾ ŝtaĉi plne mŝto doslovnego en la daŭro de traktadoj. ³³⁾ cel- montraĵ ciferoj, gvidociferoj, ³⁴⁾ smyslem lepŝi: rekonstruado neĝ elkonstruado. La respubliko ja ek- zistas, oni ĝin ne konstruas, sed re- konstruas, prebudovava se. ³⁵⁾ fari al si ideon.

Preĝlad ukolu 5.

Se iu brutala ulo penetras¹⁾ kun sia familio en bienon de la najbaro kaj prenas²⁾ liajn juvelojn, oron, konfiskus lian rikolton, ordonus al li, kion li devas³⁾ fari, kien li devas ion kaj tion meti, kien li rajtas iri kaj kien li ne rajtas, kion li povas skribi, ja eĉ⁴⁾ kion li devas skribi kaj entute, kiel li devas vivi, tiam oni dirus, ke li estas rabisto, krimulo, kaj en la jura ŝtato oni venigus kontraŭ li⁵⁾ ĝendarmon. Oni lin arestus. Li estus juĝata laŭ la kriminala juro⁶⁾ kaj tutcerte li ankaŭ estus kondamnita.

Kaj ĉi tie⁷⁾ antaŭ la okuloj de la tuta mondo, okazis io simila. La germana najbaro kun okdek milionoj da loĝantoj, riĉa, kun grandegaj karbotrovejoj,⁸⁾ kun vastege evoluinta⁹⁾ industrio kaj komerco, sisteme sin preparis por rabado. Subite ĝi atakis¹⁰⁾ dekkvinqmilionan ŝtaton kaj rabas ĉion kion ĝi trovas. Ĉu tio povas esti farata senpune? Ĉu la internacia punjuro povas toleri,¹¹⁾ ke tia krimo estu nepunata, ke la nacio ne estu pro tiu rabokrimo juĝata kaj punita?

Tiel demandis juristoj, tiel deman- dis simplaj homoj ĝis nun opinian- taj, ke en la milito inter ŝtatoj ĉio estas permesata, eĉ la senpuna fardo de krimoj. Sed, kie estas la moralo, kie estas la sento, ke ni vivas en la jura mondo de la homoj, kiuj propravole donas al si leĝojn kaj obeas¹²⁾ ilin?¹³⁾ Kion fari kontraŭ¹⁴⁾ tiuj, kiuj kontraŭas la juran senton de la mondo? Ĉu la homaro faris paŝeton¹⁵⁾ antaŭen de post la mezepokaj militoj aŭ la ekstermo- militoj de afrikaj sovaĝuloj?

Tutcerte jes!¹⁶⁾ Sed la juro, same kiel la vero, devas pene batali por esti rekonita.¹⁷⁾

Poznámky.

¹⁾ enfalus en... ²⁾ ŝtelus; rabus. ³⁾ zde všude »devas« je na místě, poněvadž ten násilnický chlap to všechno opravdu našizoval jako »devo«. ⁴⁾ kaj eĉ. ⁵⁾ por li. ⁶⁾ pun- juro. ⁷⁾ kaj jen, ĉi tie... ⁸⁾ karbo-

minejoj = doly uhelné; lagro = ložisko stroje. ⁹⁾ disvolvita. ¹⁰⁾ falis sur (malbono, pesto, malfeliĉo, mizero falas sur landon). ¹¹⁾ perme-si; allasi. ¹²⁾ respektas. ¹³⁾ mondo de la homoj propravole donantaj al si leĝojn kaj obeantaj ilin. ¹⁴⁾ kun ¹⁵⁾ almenaŭ iomete progresis. ¹⁶⁾ kompreneble jes! ¹⁷⁾ devas pene sin tratabadi al rekono... al agnosko.

Tentokráté počet účastníků byl menší, všichni však přežili oba texty. Byli to: J. Brettschneider, Olomouc; M. Cimrová, Praha; Jarosl. Čížek, Praha; Eug. Griš, Poproč; L. Holoubková, Olomouc; Ant. Jandík, Pardubice; Jiří Kořínek, Brno; J. Kubásková, Staňkov; Jul. Procházková, Rajhrad; L. Proskovec, Plzeň; Ing. J. Řebíček, Havlíčkův Brod. — Kromě toho překlad 5. úlohy zaslal Jos. Steklý, Praha. Celkem 12 účastníků.

V seznamu překladatelů úkolu 2. byli vynecháni: Anna Hejnová, Praha a Ant. Jandík, Pardubice, jejichž jmény doplňujeme seznam na str. 54., prosíme oba spolupracovníky za prominutí.

nombron da bomboj detruantaj kaj ekbruligantaj. Rezultato de bombado estis tre grava. Unu punkto de pola kontraŭstaro estis nuligita, kaj kun ĝi granda parto de garnizono. Estis traŝirita ankaŭ radio-interkomunikigo.

Dum tria tago batalo ne malgrandiĝis sed plifortiĝis. Germanoj, volante por ĉiu prezo nuligi kontraŭstaron, enkondukis eksplodilo-jetilojn. Batalado daŭris seninterrompe tutan tagon kaj nokton. Nombro da viktimoj kreskadis.

Garnizono spitante lacecon, spitante radio-informojn pri katastrofa stato de batalo sur tuta pola teritorio — kuraĝon ne perdis kaj decidis batali jam ne por venki, sed por honoro de soldato kaj nacio.

Dum sekvantaj tri tagoj kontraŭulo konstante atakadis kaj pligrandiĝadis de momento al momento kanonfajron. Germanaj grupoj provis samtempe bruligi la ankoraŭ restintajn konstruaĵojn. Tiucele ili alpuŝis per la fervojreloj la cisternojn kun nafto en la defendotereton. Sed la provo malsukcesis.

En sepa tago, kiam koncentrigita kanonfajro detruis ankoraŭ unu gravan kontraŭstaropunkton, garnizonestraro, vidante maleblecon de plua defendo — decidis interrompi la malegalan batalon.

Tio estis antaŭ tagmezo. Oni kalkulis perdojn: 16 mortfalintojn, multajn vunditojn. Germanoj tamen havis ĉ. 400 mortfalintojn.

Westerplatte, Termopiloj de pola marbordo, eniris historion.

Sep jaroj pasis en la fajro de la malpaco. Homaro multe suferis.

Ni Slavoj eliris el tiu milito kun grandvalora sperto: UNUECO de ĉiuj Slavoj — garantio de paco, ordo en Eŭropo kaj kontraŭpezo de germana eventuala atako.

Se Slavoj scipovus teni kaj kontinuiĝi sian unuecon kaj kunlaboron — neniam ripetos Westerplatte kaj tragedio de la lasta milito.

Bielsko-Biala 7. 9. 1946.

Lokaj informoj

Bojkovice. La unua kurso de Esperanto en Bojkovice finis la 15-an de julio 1946, post 4 monata daŭrado. Tiu ĉi unua kurso estis nur propaganda kurso por venonta, kiu okazos dum la oktobro. La unuan kurson finis 10 entuziasmuloj, kiuj restos fidelaj al la ideo. La kurson gvidis s-ano Jan Tichoň. — La komitato de Regiona muzeo en Bojkovice decidis instali senĉesan ekspozicion de Esperanto kaj tiel doni la fundamenton por esperanta muzeo en Bojkovice. La muzeestro s-ro Al. Jašek vizitis ankaŭ la unuan kurson kaj pro tio ni bojkovicanoj esperas, ke la muzeo de Esperanto en Bojkovice vere efektiviĝos. Ni bojkovicanoj volas esti inter la unuaj.

Bratislava. La programo de la aŭtunaj kunvenoj estas tre riĉa. Krom la prezidanto de SES s-ano P. Rosa kaj la nova sekretario de SES s-ano redaktoro I. Zalupský prezentas malgranda diletanta rondo sub la gvido de amuzestro K. Kiss kaj J. Havas diversajn scenetojn, poemojn, humorajojn kpt. La plej viglaj estas f-inoj Julka Čulenová, Nori Havasová, Elza Mahrová, E. Hartlová, s-anoj Švec, L. Medlen.

Brno. En sia tradicio de Verda urbo, konata inter la monda samideanaro pro la Verda Stacio, komencis la Verda Brno tuj post la milito viglan kaj efikan laboron. Ĝia klubo, fakte la plej malnova en Ĉeĥoslovakio, (ĉar fondita en 1901) kunvenis 12-an de junio 1945 denove la unuan fojon post la liberigo. Vere sukcesa periodo ĝi estis, depost la unua kunveno, ĝis hodiaŭaj tagoj. 21 partoprenintoj de la unua postmilita kunveno kreskis ĝis fino de septembro 1946 je 102 pagintaj klubanoj. Jen fakto, kiu parolas mem.

En la lasta ĝenerala klubo-kunveno oni vere povis konstati kelkajn ĝojindajn sukcesojn, kiuj estis atingitaj sekve de la vigla laboremo de ĝia anaro, precipe tiu de ĝia nelaciĝanta prezidanto s-ano Jos. Vondroušek. Malofte oni renkontiĝas kun tiom daŭra entuziasmo kaj persista labora vigeleco kunigita kun neelĉerpebla energio, kiuj estas signoj, akompananta ĉiun lian modestan pormovadan agon. Li unuavice meritiĝas pri tio, ke la movado en Brno kreskas kaj vere floras.

Unu el la plej ĉefaj aferoj por nia movado en Brno estis la demando de l' renovigo de la tradicio de la esperantlingva elsendado de la

iama Verda Stacio de Brno, okazinta antaŭ la milito pro la fervoro de samideane entuziasmigita radio-direktoro ing. Ant. Slavík, ekzekutiĝanta de la germanoj. La nuna direktoro ne enviciĝis E-disaŭdigon en la programon ĝis hodiaŭ nur pro tiu kaŭzo, ke la stacio, multe ruinigita de la germanoj dum la liberigado, bedaŭrinde ankoraŭ ne povis restarigi sian aparaton tiom, por esti aŭdebla ankaŭ en eksterlando. Por ĝia hejma aŭskultantaro ĝia E-lingva disaŭdigo estus praktike senvalora.

Tre firma pozicio por Esperanto estis atingita en la redakcejo de l' soc.-demokrata organo Ĉin, unu el la plej ĉefaj jurnalaj de Brno. Klubano s-ro Jan Zeman, ĝia administra oficisto, sukcesis tie aperigi unue kelkajn propagandartikolojn kaj fine eĉ gvidis en la jurnalo E-kurson, vere sukcesplenan kaj certe la unuan, kiu aperis post la milito en ĉefa jurnalo.

Dum la vintra sezono 1945-46 estis samtempe gvidataj du kursoj, en kunlaboro de ŬRO. Gvidis ilin sukcesplene: la prezidanto J. Vondroušek kaj s-ano Rud. Nečas. Dum la aŭtuna sezono 1946 estas gvidataj pluaj kursoj.

Klubaj kunvenoj, okazigataj ĉiun mardon, je la 20-a horo en la klub-

ejo de l' hotelo Passage, en Lidická strato, eminentiĝas per ĉiam antaŭe firme fiksita stila programo, konsistanta el paroladoj, lingvo-praktikado, amuzaj kaj artistaj vesperoj. 86-jara naskiĝtaga datreveno de Zamenhof estis festita per muzika vespero, aranĝita en luksa Spegula halo.

Januaran Kongreson de ĉsl. esperantistoj en Praha partoprenis kiel kluba delegito prezidanto Vondroušek, funkcia dum septembro ankaŭ kiel komisionano ĉe la ekzamenoj pri Esperanto. Du klubanoj el Brno partoprenis aktive la ekzamenojn.

Zorgante pri la urba propagando, oni sukcese uzas surstratajn kestetojn kaj elmontrajn vitrajn kestojn, da kiuj ekzistas jam pli ol 12 tra la urbo en stratoj: Česká, Husova, Koblišná, Křenová, Lidická, Masarykova, Nová Hora, Orli, Palackého, Svitavská, Tábořská kaj Trávníky. Ilin celkonscie prizorgas s-anoj Adolf kaj Rudolf Nečas kun s-anino M. Adamcová.

La kolektadon de petskriboj por Unuigitaj Nacioj partoprenis la klubo per alsendo de 1.600 ekzempleroj al la Asocio. Verdsteluloj tutŝtataj estu salutataj kaj invitataj elkore al konkuro. (Jan Geryk).

En la turniro pri ĉampioneco de Internacia organizo de ŝakistoj-esperantistoj, kiu estis komenciĝinta la 1. 8. nunjare k. kiu daŭros la tutan jaron, ludas nia membro s-ano Břetislav Falta, juna, talenta k. tre eminenta ludanto. Partoprenas ŝtatoj: Ĉeĥoslovakio, Nederlando, Svedio, Danio, Anglio, Polio.

Programo de la kunvenoj 1946:

1. X. Raporto pri ekzamenoj de Esperanto en Praha. (Jos. Vondroušek). 8. X. Ĉu nia monsisistemo resaniĝos? (Tomáš Borkovec). 15. X. Ĉefa muziko en Anglujo dum la dua mondmilito. (Jan Geryk). 22. X. Rimarkoj al nuntempa politika situacio. (Jiří Kořánek). 29. X. Solena vespero por festi jubileon de nia ŝtata sendependeco. 5. XI. Teozoliaj konsideroj. (Hubert Slavík). 12. XI. Libertempaj rememoroj. (M. Vondroušková). 19. XI. Rilato de Esperanto al la lingvoj de l' Eŭropo. (Alois Potuček). 26. XI. Esperanto korespondata. (Jan Geryk). 3. XII. Virinoj rigardataj de viroj. (Rudolf Nečas). 10. XII. Zamenhofa vespero. 17. XII. Bilanco pri la jaro 1946. (Jos. Vondroušek).

Krom la programo estas praktikataj en la kunvenoj: semajna kroniko pri la movado, societaj ludoj, vivanta

gazeto, aktualaĵoj, tradukado, E-gramatiko, legado de la korespondadoj, kpt.

České Budějovice. La urbo fariĝas centro por la movado en suda Bohemio. En la loka movado aktive kunlaboras 12 — 15 personoj, kunvenantaj regule kaj prizorgantaj informadon de l' publiko per ekspozicieto en kesto sur hotelo »Slunce«, per diapozitivo en kinejo kaj per Sudbohemia Radio.

Doksy. EK ŝanĝis sian kunvenejon kaj kunvenas nun regule ĉiumerkrede je la 20.30 en hotelo »U Sysla«. Alian tempon multaj samideanoj estas kiam ajn atingeblaj persone kaj telefone. Ekspozicio estas instalita en 3 ĉambroj de domo sur la ĉefa placo, kie konstanta tabulo aktuale informas. Krome pendas anonca kaj propaganda kesto en la ĉefa strato. Prelego de s-o Josef Vitek el Hradec Králové pri Svedio la 14-an de septembro tre plaĉis, tial oni intencas ripeti ĝin en Doksy kaj en Ĉ. Lípa. La prelegon sekvis provleciono Csehmethoda prezentita de s-o K. Šolc. Tiu ĉi sukcesplena vespero estis enkonduko por kurso komencula gvidota de s-o Václav Špūr.

Hluk. La movado ĝis nun ne revekiĝis plene. Regula informado de la publiko tamen okazas per propaganda kesto fiksita sur la placo de tiu ĉi urbeto. Ĝian enhavon prizorgas s-ano Borýsek, dum la programon de neregulaj kunvenoj, ĉu en gastejo u Svadbiků, ĉu en sukerajejo Borýsek, estras s-ano Křivák.

Hradec Králové. La EK instalas kaj prizorgas kelkajn bonajn publikajn atentigilojn pri Esperanto. En la stacidomo oni trovas grandan inform-reklamon kaj en la ĉefa strato estas kesto kun informilaro. Alia pli granda ekspozicio troviĝas en kesto en koridoro de la kinejo Slavie kaj fine estas okulfrapa tabulo kun surskribo »Esperantista Klubo« fiksita sur la kunvenejo Národní kavárna. La ĉiam aktualan enhavon de la ekspozicioj en kesto vikle prizorgas kaj ŝanĝas s-anoj Vitek kaj Pytloun. S-ano Vitek zorgas ankaŭ pri programoj de la regulaj kunvenoj. Meza nombro de partoprenantoj estas 25. Multaj lokaj samideanoj estas atingeblaj persone aŭ telefone.

Jičín. Al pli ol 50 gestudentoj en ĝeinstruista instituto instruas eson prof. Jan Filip. Estas preparata kurso por gimnazianoj.

Karlovy Vary. La loka grupo de

la Esperanto-Asocio en ĈSR en Karlovy Vary jam vivas. - La fonda kunveno okazis la 17-an de septembro 1946 en la klubejo de la kafejo »Pasáž« en Karlovy Vary je la 20-a horo. La kunvenon malfermis la plej aĝa samideano R. Emmer, kiu bonvenigis la partoprenantojn, anoncis la aprobon de la statuto fare de la Landa nacia komitato kaj tralegis la statuton. Samideano Jiří Čechner faris ĉeĥlingvan prelegon pri Esperanto kaj E-movado. Sekvis parolado de samideano Frant. Mílek pri la lingvo Esperanto koncerne facilecon de ĝiaj gramatiko kaj strukturo kun konvinkaj ekzemploj. La ĉefa punkto de la kunveno estis elektioj de la komitato. Unuanime estis elektitaj. Prezidanto Rudolf Emmer, vicprezidanto František Mílek, sekretario Antonín Pilař, kasistino Antonie Sahánková, bibliotekisto Jiří Čechner, revizoroj František Mašek kaj Marie Hegrová. Ekspozicio de esperantaĵoj altiris la atenton de la ĉeestantoj. - La regulaj kunvenoj de la grupo okazas ĉiumarde de la 18-a ĝis la 20-a horo en la klubejo en la banloka domo »Kosmos«, Zahradní ul. 41, kies estro estas prezidanto de la jus fondita grupo. La grupo sukcesis gajni esperantajn librojn de kelkaj iamaj germanaj samideanoj kaj tiamaniere fondi sian bibliotekon kun 150 volumoj. Estas preparata esperanta kurso, al kiu invitas belaj presitaj prospektaj. Adreso F. Mílek, Koněvova 5/II.

Klimkovice. Pasintjara kurso finiĝis kun 11 p. el Svaz české mládeže. Estas plano starigi Rondon de E-amikoj el personoj simpatiantaj, sed ne emaj lerni la lingvon. S-ano Raška dediĉas multajn tempon kaj energion ankaŭ al la movado en Ostrava.

Kopřivnice. Du surstrataj kestoj en la ĉefstrato atentigas pri Esperanto, pruntitaj de Svaz české mládeže (Asocio de ĉefa junularo) kaj Junák (Skoltaro). Ilian enhavon prizorgas s-ano Zanáška, kiu samtempe reĝisoras la programon de regulaj kunvenoj.

Mladá Boleslav. EK funkcias provizore kaj atendas aprobon de l' statuto. Ekspozicia ŝranko estas preparata, dume aperis ekspoziciaĵoj en komercejaj fenestroj. La laborplano de la gvidanto s-ano Šolc antaŭvidas 100 membrojn ĝis fino de l' jaro.

Praha. La programo de la kunvenoj konsistas el informoj pri aktualaj

novajoj de la movado en- k. eksterlanda, pri kursoj, radioelsendado ktp. - Preskaŭ ĉiun kunvenon okazas diverstemaj interesaj prelegoj. - Krom tio la membroj prunteprenas librojn el la kluba biblioteko, aĉetas diversajn esperantajojn kaj amike konversacias. Dume la funkciuloj pri-traktas multajn organizaajn aferojn de la Klubo k. Asocio. La kunvenoj estas tre viglaj, meznombra vizito estas 50 personoj. Lastatempe multigis vizitoj de eksterlandaj gastoj en la Klubo. EKP entreprenis komunajn ekskursojn en provincajn urbojn por partopreni kursfinajn festojn k. regionajn kunvenojn, nome: 26. I. Mladá Boleslav — 7 partoprenintoj, 16. III. en Hradec Králové — 4 p., 18. V. en Doksy — 5 p. kaj dum Pentekosto (10. VI.) partoprenis s-ro Slanina la inaŭguron de »Esperanto memorŝtono« en Olomouc kiel delegito por Praha. — Samideanoj el provincaj lokoj, elektu Vian viziton al Praha laŭeble ĉiam tiel, ke Vi povu viziti merkrednian Klubon. Vi estos ĉiam sincere bonvenigataj! Menciindaj prelegoj en 1946:

23. I. s-ro Malík: Meritoj de prezidento Dr Beneš en la batalo kontraŭ faŝismo k. por la demokratio. 30. I. s-ro Echtner: Esperantista blindulmovado. 13. II. s-ro J. Bendová: Lydia Zamenhof; s-ro J. Forge: Miaj sortoj k. impresoj en ĈSR; adiaŭo al Polujo. 20. II. s-ro G. Gígimov: Bulgarujo-historio de l' lando k. de tiea esp. movado. 20. III. s-ro J. Mařík prezentis la baladon de K. J. Erben »La Saliko«. 27. III. 4 s-anoj prezentis la baladon de K. J. Erben »La Nikso«. 3. IV. s-ro Ŝustr legas leteron de Kola Aja, kiel soldato d. USA arm. 10. IV. s-ro Ŝustr k. Mařík: Memorparoloj pri la morto de la Majstro Zamenhof. 17. IV. s-ro Jukl, Bratislava: Slovaka esperanto-movado. 8. V. s-ro Echtner: Masaryk kaj Esperanto. 29. V. s-ro prof. Novljan: Perfektigo de nacia lingvo pere de Esperanto. 5. VI. s-ro K. Domoslawski, Varsovio: Polujo nun — reviviĝo de esp. movado k. renoviĝo de tomo de Majstro; 12. VI. s-ro prof. Novljan: Perfektigo de homo pere de Esperanto. S-ro J. Mařík: Radioparolado de s-ro Hromada por Somera universitato en Udevala, Svedujo. 19. VI. s-ro prof. Novljan: »Kial Terst k. Julia Venecia al Jugoslavio?; s-ro Malík anoncas ra-

diokurson de Praha en oktobro. 26. VI. »Amika vespero«: ĉeestis oficialaj gastoj de min. inf. k. Skand. soc.; s-ro J. Vitek: Prelegvojaĝo tra Svedujo, kiel sendito de ministerio por informado.

Olomouc. Esperantista societo aranĝis la 19-an de septembro sian duan postmilitan ĝeneralan kunvenon. Oni konstatis, ke la agado ĝojige disvastiĝas. Dum la pasinta jaro gvidis s-ro ekslernejstro Neužil 4 kursojn por komencantoj. Ni havas 5 informtabulojn en la urbo. Societa biblioteko, kiu enhavas 530 librojn, estas lokigita en la publika urba biblioteko en Tř. 28. řijna, kaj estas tiamaniere alirebla por la tuta urba publiko. Ĉiuj 5 tagjurnaloj de Olomouc publikigas tre ofte niajn informartikolojn. En Volné Slovo ni havas ĉiuvendredan rubrikon »Esperanto«. La urba disaŭdigo tre kompleze anoncas ĉiujn niajn entreprenojn. La restarigita memorŝtono en la Smetana-parko faras al nia movado tre bonan propagandon, same la proksima Zamenhof-strato. Someran esp. universitaton en Doksy partoprenis fino Holoubková, s-ro Kouřil kaj s-ro Blažek, ĉiuj kun bona sukceso. La societo havas nun belan kunvenejon en Masarykplaco 25. Kunvenoj jaŭde je la 19 horo. Oni decidis entrepreni ĉion por la plej rapida disvastiĝo de nia movado. Antaŭ la elektoj estis kun festa alparolo elektita longjara meritplena prezidanto de la societo kaj instruisto de Esperanto s-ro Albin Neužil honora prezidanto. Oni transdonis al li belan diplomon kun subskriboj de ĉiuj membroj. Kiel nova prezidanto estis elektita s-ro dro Vlad. Mohapl, Třída Svornosti 4, vicprezidanto s-ro Frant. Kuba, Kijevské nř. 17, sekretario s-ro Jar. Karhan, Sarkandrova 8, kasisto s-ro Josef Všolek, Dvořákova 31. Krome pluaj komitatanoj havas specialajn funkciojn: s-ino A. Přehnilová, gvidantino de tradukantoj, s-ro V. Blažek, propagandisto, s-ro Fr. Pospíšil, gvidanto de kunvenaj programoj.

Ostrava. Ekskurso de 20 partoprenantoj (esperantistoj kaj »gastoj«) la 8-an de septembro al Hradec apud Opava tre sukcesis dum bela vetero. Antaŭtagmeze ili ĉeestis inaŭguron de Komenský-monumento fare de ĉs eklezio, posttagmeze ili partoprenis en vizito de muzeo kaj parko en la kastelo kaj dancadon en Národní dům. — La regulajn kunvenojn par-

toprenadis en la pasinta duonjaro meznombro 15 p.

Plzeň. La okcident-Bohemiaj Esperantistoj atentigas pri sia laboro ne nur en siaj regulaj kunvenoj, sed ankaŭ per konstanta afiŝado en la vestiblo de Měšťanská Beseda, kaj per informtabulo en la ĉefa stacidomo kaj ekspozicio en fenestro de flormagazeno Svoboda, (la posedanto estas s-ano), en Ŝafařík-parko n-ro 1. La laborkunvenojn kutime ĉeestas almenaŭ 10 p.

S-ro Jaroslav Pelcman (Škodovy závody — Modelárna) dissendas ĉefan ciklostilitan leteron en kiu li klarigas signifon de Esperanto kaj pleddas por ĝia uzo fare de socialistaj organizaĵoj. Li atentigas ankaŭ pri ebleco inviti al Plzeň kongreson de laboristaj esperantistoj, kiun povus partopreni 2.000 p. - En Radio-Plzeň prelegis ĉeflingve pri »Estiĝo, signifo, graveco de unueca lingvo internacia Esperanto, precipe por nacio ĉefia« maljuna pioniro de la movado Fr. Kavan.

Praha. Laborlernejo ŬRO en kunlaboro kun la E. Klubo komencas en oktobro novajn E-kursojn: Du komenculajn po 34 horoj lundon, jaŭdon kaj mardon, vendredon ĉiam 19-21 horo; kurskotizo 180 Kĉs, por anoj de ROH (Revolucia sindikata movado) 120 Kĉs. Kurson por progresintoj en 34 instruhoroj lundon, jaŭdon, 19-21 horoj; kurskotizo 180 Kĉs, por ROH-anoj 120 Kĉs. Novan kurson triagradan gvidatan de lektoro de la Teknika altlernejo Dr Aug. Pitlík; en instruplano de tiu ĉi kurso estas specialaj partoj el esperanta gramatiko kaj internacia sintakso, historio de la esperantista movado, resumo de Esperanto-literaturo originala kaj tradukita; kurskotizo por la 50-hora kurso 300 Kĉs, por ROH-anoj 200 Kĉs; mardon, vendredon, 19-21 horo; tiuj, kiuj finis tiun ĉi kurson, povas ekzameniĝi sin antaŭ dekano kaj lektoro de la Teknika altlernejo. Aliĝojn akceptas oficejo de la Lernejlaboro en Praha II, Jerusalemská 5, tel. 228-41. La cirkulero invitanta al aliĝoj subskribita de la direktoro de la Lernejo Inĝ. Frant. Šmíd diras en sia komenco: Gojiga sukceso de Esperanto-kursoj, kiujn la laborlernejoj malfermis pasintan jaron, pruvas, ke laboristoj per mano kaj per cerbo ĝuste taksis signifon de interkompreniga lingva ligilo inter la nacioj. Kaj Esperanto fakte estas tia, ĝi servas al la

homaro jam depost la jaro 1887, kaj ĝi fariĝis precipe al anoj de malgrandaj nacioj malhavebla.

Prostějov. En la ĉefstrato kondukanta de la stacidomo troviĝas en granda fenestro de komercejo konstanta ekspozicieto propaganda, bone zorgata de s-ano Stan. Jeřábek. La regulajn ĉiujauĉajn kunvenojn kutime ĉeestas almenaŭ 8 personoj. Krome estas eble trovi samideanojn ĉiutage ĉu persone, ĉu telefone.

Rumburk. Konversacian Rondeton de s-ano Zelníček partoprenas 12 personoj.

Radvanice. La neregulajn, kunvenojn kunvokatajn perletere partoprenadis ĝis nun meznombro 8 p. Publikan informadon prizorgas s-o Taraba per ekspozitado de e-ajoj en kesteto pendanta vid-al-vide de la urba oficejo.

Slezská Ostrava. Rondeto esperantista dissendis al siaj membroj kaj interesantoj ĉeflingvan ciklostilitan cirkuleron invitantan al kunveno en Lidový dům ĉiun sabaton je la 19-a. Gazetoj kaj riĉa biblioteko estas je dispono de vizitantoj.

Stonava. La 22-an de septembro kunvenis sileziaj esperantistoj de la 18-a regiono. La celo de tiu ĉi kunveno estis firmigi amikajn interrilatojn, prezenti nian movadon al la publiko kaj pridebati kelkajn regionajn kaj kulturajn demandojn. Ni scias, ke nur koncentrigo de ĉiuj fortoj alportos sukceson al nia laboro.

Tábor. La plivigligon de la loka movado ilustras tre bone, ke la meza nombro de partoprenintoj en regulaj kunvenoj dum la pasinta duonjaro estas 15. Kurso en la Laborlernejo ŪRO komencis la 4-an de oktobro en ejo de Komerca akademio. Kursotizo 80 Kčs, por soldatoj kaj studentoj 50 Kčs; gvidas ing. Lad. Krajič.

Ústí n. L. 22. VIII. unua kunveno de la nove fondita EK, ĉeestis 16 personoj, el kio 11 estas novaj s-anoj. Regulaj kunvenoj ĉiujauĉe. La loka sendstacio preparas regulan dissendadon en Esperanto. Kurson supozeble aranĝos Lidová škola, tiucela propagando estas preparata per publika afiŝado kaj ekspozicieto.

Vesec u Liberce. En lernejo de junaj laboristoj de la loka fabriko estis en septembro komencita E-kurso gvidata de faka instruisto Aug. Adam.

Teplíce-Šanov. La loka movadon inaŭguris somerfina ekskurso la 28. IX. Ĝin partoprenis la meritplena pionirparo ges-oj Sklenčka, ges-oj Černý, ges-oj Lešák, nova fervorulo s-o Rohanzi kaj bangasto el Praha s-o V. Echtner, entute 8 p. Oni akceptis saluton de s-o Košťál forrestanta ĉe E-ekzameno en Praha. La sukcesintan entreprenon ilustris agrabla kunsido sur altaĵo Barvář, de kie oni superrigardis la novan laborkampon plugreptan. S-o E. parolis pri la stato de nialanda movado, al situacio en EAĈSR kaj sugestis laborplanon. S-o Sklenčka amuzis nin per jen ĝajaj, jen seriozaj rememoroj el sia riĉa sperto de 40jara E-laboro. S-oj Lešák kaj Rohanzi klarigis siajn ideojn por la renovigo de la loka movado, dezirante resti en vigla kontakto kun la centro en Praha kaj kun najbaraj grupoj, precipe Chomutov (ges-oj Hoffmann, Libušina 12) kaj Ústí n. L. Oni akceptis inviton al laborkonferenco 30. IX. en Ústí n. L., kiun ĉeestos s-oj Lešák kaj Echtner. - La memorigindan tagon por ĉiam dokumentos fotografajo de la laborgrupo. Bedaŭrinde ne ĉiuj ĝis nun konataj lokaj s-anoj povis ĉeesti. Oni konstatis, ke entute 11 s-anoj estas en Teplíce-Š. kaj oni esperas trovi ankoraŭ aliajn. Nebula estis la bildo de la pejzaĝo sub Barvář, sed antaŭ ol finiĝis la konferenco, ĝi klarigis en hela sunbrilo. El tiu simbolo ĉiuj ĉerpis bonan esperon.

Zlín. Kurson pro studentoj de gimnazio gvidis Frant. Bláha, faka instruisto. La kurso havis 32 p. kaj finiĝis en junio 1946. Ekspozicio aranĝita en junio en gimnazia ejo havis bonan sukceson. Ankaŭ gazetaro menciis ĝin proprainiciate.

E-gazeto en Hungario estis malpermesita. El Hungario venis informo: »Oni malpermesis la eldonon de »Sudhungarlanda Stelo«, la sola E-gazeto, kiu aperis en Hungarijo post la milito. (Ĝia lasta aperinta numero estas la julia-aŭgusta). - Ni petas represi tiun informon en ĉiuj E-gazetoj. Estimplene Stefano P. Nagy, eksredaktoro, Gyula, la 15an de sept. 46.« Ni turnas atenton de niaj legantoj al tiu ĉi tre grava sciigo. Rememoru, ke antaŭ du-tri monatoj oni fanfarone informis el Budapeŝt, kvazaŭ madjaraj deputitoj disponigus hungarian parlamenton por kunvenoj, kiuj proklamas posedante por tio ian aŭtoritatecon enmeti Espe-

ranton en lernejoj de publikaj lernejoj en Hungario. Kaj nun modesta revuo propaganda estas malpermesata, pro kaŭzo nesciigata al ni. Nia konsilo ripetata jam plurfoje: ne troigu! Persistu kaj estu singarde-maj! Similaj sciigoj pri malpermesoj povas veni ankoraŭ el aliaj landoj. Tio ankaŭ dokumentas, ke ni estas »movado«.

Jubileaj poŝtmarkoj sovetaĵ el la j. 1927 (40 jaroj de E.) kun bildo de Zamenhof, surskribo »Esperanto« kaj verda stelo, uzitaj por 13.—, neuzitaj por 39.— Kčs, estas riceveblaj en la filatela magazeno Kwasniak, Praha II., Štěpánská ul. Ev. mendojn, kun samtempa alsendo de la indikita sumo plus Kčs 7.40 por registrita forsendo, direktu al nia asocia sekr. J. Mařík, Praha II., Krakovská 20/I.

En aferoj de **Senanciĉca Asocio Tutmonda (SAT)** turnu Vin ĉiam al ĝia peranto Josef Patera en Plzeň, Dvořákova 24.

Letervespero. Esperantista societo en Olomouc aranĝos la 14-an de decembro letervesperon kun programo je memoŝo de naskiĝtago de dro Zamenhof. La societo invitas ĉiujn samideanojn, kiuj havas la eblecon viziti nian amuzvesperon. Tiuj, kiuj ne povas ĉeesti, bonvolu skribi salutkartojn aŭ salutleterojn. La plej interesaj sendaĵoj estos rekompencaĵoj per esperantolibroj.

Kiu volus kaj povus bone traduki **Haviŝkál balada de Marie Majerová** informu pri tio B. Vlčeková en Kladno 3, Tichá 110. Estas eble publikigi ĝin en fremdlando.

Urbaj legejoj estas grava centro kultura. Nepre devas tie esti nia organo »Esperantista«. Lokaj grupoj bonvolu ĝin aboni por publika legejo en Via urbo! Por tiu celo ni liveras ĝin por rabatita prezo 50 Kčs! Nepre faru tiun ĉi oferon pro nia kaj Via afero!

Korespondi kun ĉs samideanoj deziras:

Georgi Ganjev Georgiev, selo DJADOVO, Novo-Zagorsko, Bulgario deziras korespondi ĉ. t. Slobodan Velicki, Vele Nigrinove 12, Beograd, Jugoslavio (22jara, studento).

Klemens Wiečorek, P. Topferberg 1, (10) LOEBAU, Sachsen (Germanio).

Esperantista Societo »Libereco«, V.

GLAVACI-VRAČANSKO (Bulgario) deziras korespondadon kolektiv-
van aŭ individuan kun la tuta mon-
do.

Aleksandro Kassai, Bérkocsi u. 5,
BUDAFOK (Hungario), junulo 21-
jara pri ĉiuj temoj precipe pri lite-
raturu, poŝtmarkoj, bildkartoj. Res-
pondo garantiata.

Novaj libroj.

*La mond-paco kiel psikologia proble-
mo. Antaŭparolo al la psikologio
de la kulturaj degenerfenomenoj. De
Hans Thirring. El la germana origi-
nalo tradukita de Hugo Sirk, Vieno.
Esperanto - Eldonejo »Tramondo«
Soc. k. l. r. 1946. — Paĝoj 36, 20x
15 cm. — Profesoro de Wiena uni-
versitato Hans Thirring verkis dum
la nova politika situacio rapide bro-
ŝuron, en kiu li pretendas kvazaŭ li
estus elpensinta gravajn metodojn
aŭ principojn, per kiuj aŭ sur kiuj
povas esti starigita aŭ efektiviĝita
mond-paco. Laŭ lia asetro la broŝu-
ro estas mallonga resumo de ape-
ronta libro titolota »Homo sapiens,
fundamentoj de psikologio de
la kulturaj degenerformoj«. La tito-
lo men vekas suspekton. Tiu babilado
pri degenerado de kelkaj nacioj
aŭ de la homa gento ĝenerale estas
ja suba tono zumanta sub laŭtaj pa-*

roloj de naziismaj »filozofoj«. Ni
forgesu Spengler-on, kies supozo
pri »Pereo de la okcidentlando« fa-
riĝis elirpunkto de stultajoj Rosen-
bergaj. Kaj tuj post disbato kaj dis-
falo de Hitlerana konstruado ni aŭ-
das de profesia filozofi-profesoro la
vorton pri degenero kiel kaŭzo de
haoso. Kun sama miro ni aŭdas pri
ideo de »Mio«, la fame konata kon-
ceptajo Fichtea, de tiu Fichte bata-
lanta kontraŭ la franca klara raci-
emo kaj predikanta kredon je misti-
ka esenco. nacia esprimebla sole per
ekstazaj vortoj plenaj de artefarite-
co. La leganto malĝojiĝas pro tiuj
faktoj. La malĝojo kreskas, kiam oni
trovas, ke la aŭtoro, tiom memfida
en sia antaŭparolo kaj promeso de
ampleksa verko, nenion novan scias
diri pri psikologiaj eblecoj por krei
pacon. Li rakontas kiel pri tre freŝa
inventajo pri ludema instinkto, sed
nek unu vorton ni trovas pri la ne-
solvita psikologia problemoj, ĉu kaj
kiomajn instinktojn la homo pose-
das laŭsperte. La verketo volas ple-
di kontraŭ naziismo germana, sed ni
ne kredas, ke tiaj pledoj estos efikaj.
Oni devos uzi efektivan esploron
psikologian, pri kies metodoj kaj
eblecoj la aŭtoro ne ŝajnas sufiĉe
informita. La lingvaĵo de germana
originalo estas banala. La esperanto-
traduko estas eminenta. La tradu-

kaŭto tre sukcese redonas la ideo-
ron de la aŭtoro sed lia lingvaĵo est-
as multe pli bona laŭstila. La tradu-
ko superas la originalon.

Ukol 7.

Překlady tohoto textu raĉte poslati
do 30. listopadu 1946.

My, lid český a slovenský, z celého
svého srdce a v nerozlučné jednotě sli-
bujeme v této dějinné chvíli, poctivou
prací, věrně, ukázněně a ze všech
mravních i fyzických svých sil, splnit
s láskou a každý na svém místě, vzne-
šený příkaz velikého budovatelského
plánu, daného nám milovanou otčinou.

Věrní obětem boje za svobodu, hodní
odkazu těch, kteří se nedočkali, zavá-
záni všem, kteří prošli bolestí a krví,
naplnění láskou k přicházejícím pokolením
a nemilosrdní k rušitelům díla, sli-
bujeme na svou čest a před světem,
který se na nás dívá, vybojované zajistit
vítězstvím příkladné práce.

Nechť klenba historického říjnového
výročí zvučí v budoucnu ještě slavněji
dokonaným úsilím, ke kterému se hrdě
a slavnostně zavazujeme.

My, lid český a slovenský, promění-
me dvouletý plán v čin!

Slibujeme! Slibujeme! Slibujeme!

Dvouletce zdar!

Komunistická strana Československa.
Československá strana národně socia-
listická.
Československá strana lidová.
Československá sociální demokracie.

KRONIKO ENLANDA.

*Ekzamenoj pri Esperanto ĉe Ekzamena komisiono
de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko okazis
la 27-an de septembro je la 19—23 horo kaj la 28-an
je la 9—13 horo en Praha, Jerusalemská 5, en ejoj de
la Labor-lernejo ŬRO. Anoncis sin ĉe tiu kunsido al
ekzameno unuagrada (pri lingva scio de Esperanto)
6 kandidatoj (5 viroj, 1 virino), al la duagrada (pri
kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj) 22
kandidatoj (20 viroj, 2 virinoj). La hejmaj taskoj de
la kandidatoj por la duagrada diplomo estis trovitaj
kontentigaj ĉe 21. El tiuj 21 kandidatoj du ne povis
prezenti sin al la ekzameno. Iliaj hejmaj taskoj kaj
ekzamenkotizoj validas por la venonta kunsido de la
komisiono. Al la aŭtoro de la nekontentiga hejma tas-
ko estis rekomendite aliĝi al la unuagrada ekzameno
kaj li faris tion.*

Ekzamenis du ekzamenaj senatoj. Unua: Dr Stan.
Kamarýt, prezidanto, Dolfa Bartošik, Oto Ginz, Rudolf
Hromada. Dua: Prof. Josef Kožený, prezidanto, Inĝ.
Lad. Krajčic, Dr Tomáš Pumpr, Josef Vondroušek.

La ekzameno pruvis jam per la nombro de la kandi-
datoj tre profundan fervoron de ĉefiaj esperantistoj
dediĉi sin al funda studo de la lingvo internacia. Sed
ankaŭ la procedo de la ekzameno mem dokumentis, ke
tiu ĉi fervoro ne restas sur supraĵo de la problemoj;
pluraj el la ekzamenatoj pruvis tre eminentan scion de

la lingvo kaj de ĝiaj teorio kaj historio, multaj pruvis,
ke ili bonege estras la lingvon kiel vivantan interkom-
prenilon, ĉiuj pruvis, ke ili dediĉas sin al nia afero kun
modela komprenemo.

Rezultato de la ekzamenoj estas la jena:

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis:

Vlastimil Blažek, oficisto de ŝt. fervojoj en Olomouc.

Ladislav Blecha, oficisto de ŝt. fervojoj en Liberec.

Jaroslav Čížek, tramisto en Praha.

Bedřich Grym, poŝta oficisto en Bruntál, t. t. soldato.

Alois Kouřil, oficialo de ŝt. fervojoj en Olomouc.

Lad. Kynčl, posedanto de ĝardenoj en Praha.

Jan Molnár, banka oficisto en Praha.

Bohuslav Novotný, fervojisto en Hlušovice, p. Bo-
hušovice u O.

Milada Pohorská, oficistino en Chroustovice.

Antonín Rauvolí, faka instruisto en Ml. Boleslav.

Frant. Schwarz, fergisisto en Sezimovo Ústí.

Diplomon pri la Kapableco instrui Esperanton en
lernejoj kaj kursoj ricevis (en la krampoj estas temo
de la hejma tasko de la ekzamenato):

Jiří Bartoš, maŝinseruristo, t. t. studanto de la In-
dustria lernejo en Ml. Boleslav (Turismo kaj alpinis-
mo).

Vlasta Boháčová, faka instruistino en Praha (En ki-
un gradon de lernejoj Esperanto plej taŭgas?).

Jan Dominik, profesoro en Brno (Pri viva vorto).

Inĝ. Karel Fanta, oficisto de ŝt. fervojoj en Liberec (Ekspozicio en Liberec 1946).

PhC Jan Geryk, koncertmajstro en Radio en Brno (Ĉeĥa muziko en Anglio dum la mondmilito).

Josef Hanuš, ĉefa oficisto de ŝt. fervojoj en Ĉ. Lípa (Kunmeto de vortoj en Esperanto).

Antonín Jandík, komerca oficisto en Pardubice (Prepozicioj en Esperanto).

Stanislav Jeřábek, komercisto en Prostějov (Esperanto kaj la komerco).

Alois Košťál, librotenisto en Trnovany (Ŝakludo inter esperantistoj).

Frant. Patera, teknika oficisto en Cheb (Elparolo kaj akcento en Esperanto).

Jar. Pelcman, modelisto en ŝkoda-fabrikejoj en Plzeň (Batalado por socialismo kaj lingvo internacia samtempe kaj sammaniere).

Antonín Sattěk, faka instruisto en Příbor (Ĉu ĉeĥoj estas pli muzikemaj ol ceteraj nacioj?)

Antonín Slanina, tajloro en Praha (Oratora kurso kiel suplemento en Esperanto-kurso por progresintoj).

Josef Slepíčka, ĉefa oficisto de ŝt. fervojoj en Vodňany (Signifo de universalaj kongresoj).

Zdeněk Tubl, komerca oficisto en Praha (Rilato de eklezioj kaj religioj al Esperanto).

Jan Valeš, komercisto en Praha (Ĉefismoj en Esperanto).

Ĉe la unuagrada ekzamenoj estis donitaj notoj

| | |
|----------|---|
| eminente | 2 |
| tre bone | 6 |
| bone | 3 |

Ĉe la duagrada ekzamenoj estis klasifikitaj kiel

| | |
|-------------------|---|
| eminente kapablaj | 3 |
| tre bone kapablaj | 5 |
| bone kapablaj | 3 |
| kapablaj | 5 |

Ĉiuj ekzamenitoj akceptu nian gratulon pro sia sukceso kaj dankon pro sia idealismo, kiu instigis ilin en persisto al la celo. Persisto estas virto por nia laboro la plej bezona.

La saman tagon, kiam la ekzamenoj finis, sabaton 28. IX. je la 21-a horo informis pri la ekzamenoj la malongonda disaŭdigo el Praha. Prelegon 8-minutan legis unu el la ekzamenitoj s-o St. Jeřábek el Prostějov, kiu donis raporton pri la ekzamena procedo kaj rezulto kaj legis la esperantlingvan tradukon de la skriba tasko por la duagrada ekzameno. Lia prelego pruvis, ke li prave estis trovita »tre bone kapabla«.

Teksto al Poem de Zdeněk Fibich en Esperanto. »Poem« estas unu el la plej sukcesaj komponaĵoj de la fama ĉeĥa komponisto (1850—1900). Pro la sukceso de la muziko verkis Karel Balling sub ĝi ĉeĥan versan tekston, kiu fariĝis tre populara. Nun (en septembro 1946) aperis tiu ĉi komponaĵo por piano, voĉo kaj violono (laŭ plaĉo) kun tekstoj ĉeĥa, angla, franca kaj esperanta. Tiu ĉi estas farita de Rudolf Hromada kaj nepre superas la tekstojn anglan kaj francan estante multe pli laŭvorta kaj same bone kantebla kiel la originalo ĉeĥa. Li plurfoje sukcesis imiti eĉ la sonojn ekz.: Por ĉeĥa *háj* oni kantas *gaj'*, por *dál val'*, *stín ĝin*. Enmeto de esperanto-teksto en tian eldonajn tre popularan signifas per si mem propagandon laŭ du vidmanieroj. Estas propagandata ĉeĥa muziko al alilandanoj, estas vidigata kantebleco de esperanto al ĉeĥaj

muzikantoj. La verkon eldonis firmao Fr. A. Urbánek a synové en Praha II, vedle Národ. divadla. Ĝi estas tre bele presita kaj kostas 18 Kčs en ĉiuj librovendejoj. Por fremdlando ĝi kostas 4 respondkuponojn kaj liveras ĝin nia Libro-servo.

Antaŭ nelonge aperis ĉeĥa libro »Štafeta« de František Omelka, aŭtoro de »Aventuroj de Antonio«. Eldonejo: »Tisk«, Zlín, 1946, presejo: Česká grafická unie, a. s., Praha, prezo 80.— Kčs broŝ. Ilustris A. M. Machourek. Ricevebla en librovendejoj. - Sur la kovrilo de la libro estas klarigo, ke ĝian aperon ebligis Esperanto kaj kanadaĵ Esperantistoj. Studento Jack Scrivener el Vancouver prizorgis detalan materialon por la libro, priskribanta okazintaĵojn en Alasko, kiu emociis la tutan civilizitan mondon antaŭ dudek jaroj, kaj almetis jenan leteron (ĝi estis en la j. 1939): »Mi komencis lerni la ĉeĥan lingvon. Ni preĝas en Kanado por la libereco de via lando. Same kiel via ŝtato, ankaŭ la Brita imperio, Francujo kaj Usono estas demokrataj landoj, kie perforto ne signifas juron. Mi ne diras pli, ĉar tio povus malutili al vi. *Dio savu la Ĉeĥoslovakian respublikon!*«

Informo pri la E-prelego de L. G. C. de Jong en Praha estis disaŭdigata en pluraj lingvoj per la malongonda elsendo de Praha. Redaktoro de l' informo, liverita de ĈTK, akcentis precipe la amikan atmosferon inter diverslandaj Esperantistoj.

Konfirmo el USSR pri aŭskultado al E-elsendoj de Praha. El Sovetunio (Leningrad) venis al la Radio Praha, fine de sept., la unua letero, konfirmanta aŭdon de nia mallongonda E-programo. La skribinto estis plena de ĝojo, ricevinte hazarde la E-elsendon de Praha. Li diras, ke la E-movado ŝajne malaperis en Sovetunio kaj petas informon, ĉu la movado renoviĝis en la mondo.

VERDA STACIO refunkcios! Niaj eksterlandaj amikoj senĉese petas pri renovigo de la Verda stacio. Baldaŭ plenumiĝos ilia kaj nia deziroj. La Verda stacio Praha elsendis la unuan inaŭguran artprogramon antaŭvespere de la nacia festotago ĉeĥoslovaka, la 27-an de oktobro, je 23.00—23.30 h. de MET, per la stacio Praha I. La programo kompilita de Dr T. Pumpr estis tre taŭga por sia celo. Aktoroj de teatroj en Praha eminentis legante kaj kantante. Reĝisoris Bezdiček, komentariis Hromada. Detalan programon ni enskribos en venonta numero.

Grava oficiala rekono al la Esperanto-disaŭdigoj. Inĝ. Arnošt Bělohávek, ĉefredaktoro (en la estraro de l' ministerio por informado) de la fremdlingvaj disaŭdigoj konstantis en sia radioprelego »La fremdlando rigardas nin« (per la stacio Praha II., la 10-an de julio, je la 18,20 horo): »Praha elsendas en dekunu lingvoj: por Bulgario, Jugoslavio, Sovetunio, Anglio (kpt.) kaj krom tio en Esperanto, sur la mallonga kaj meza ondoj. La Esperanto-elsendado apartenas al la plej multe aŭskultataj el ĉiuj.« - En letero, sendita al nia as. sekr. J. M., inĝ. Bělohávek skribas: »Via letero, kiun mi tralegis kun neordinara intereso, instigis min, konatiĝi pli proksime kun la senperaj kunlaborantoj de la Esperanto-elsendado. Mi vizitis la Ĉs. radion kaj kompletigis ankoraŭ viajn informojn. — Mi esperas, ke vi nenion kontraŭdiros, se mi uzos Viajn detalajn informojn por konatiĝi nian publikon kun la laboro

de l' Esperanto-Asocio en ĈSR. — Mi aludis jam kelkfoje en miaj gazetartikoloj, ke la Esperanta mallongonda elsendado estas la unusola, kiu havas pli grandan resonon en la eksterlando.« (La letero venis en koverto de la cit. ministerio.)

Lecionoj de Esperanto-lektoro en Teknika altlernejo en Praha Ph Dr Aug. Pitlík komencis en oktobro, po du horoj semajne.

Regiona kunveno en Olomouc okazos la 15-an de decembro, antaŭtagmeze. La Asocio invitas al grandnombra vizito. Samideanoj dezirantaj partopreni la amuzan letervesperon de la Esperantista Societo en Olomouc, okazanta sabaton la 14-an de dec. vespere, bonvolu sin ĝustatempe anonci ĉe Vlast. Blažek, str. Dvořákova 36.

Redakcio parolas.

En nia numero ni dediĉos grandan parton da loko al informoj organizaj. La adresoj tie donotaj estas el respondoj al demandaroj, kiujn ni dissendis al organizitaj samideanoj. Estas grave, ke aktivaj esperantistoj konu almenaŭ siajn adresojn. La listoj ne estas ankoraŭ tro longaj. Ni atendas pluajn nomojn por plilongigi tiajn nomarojn.

KIE KUNVENAS ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO.

| | | |
|------------------|-------------------------|------------------------------------|
| Brno | mardo, 20 h. | hotelo Passage, str. Lidická. |
| České Budějovice | mardo, 20 h. | hotelo Slunce, placo Masarykovo. |
| Doksy | merkredo, 20 h. | hotelo U sysla. |
| Hluk | rendevuejo | sukeraĵejo Borýsek. |
| Hradec Králové | merkredo, 20 h. | kafejo Národní. |
| Karlovy Vary | mardo, 18 h. | bandomo Kosmos, str. Zahradní 41. |
| Kopřivnice | ĉiu dua merkredo, 19 h. | burĝa lernejo. |
| Mladá Boleslav | mardo, 20 h. | hotelo Grand. |
| Olomouc | jaŭdo, 19 h. | klubejo pl. Masarykovo 25. |
| | mardo, 16 h. | parko apud la Memorŝtono. |
| Ostrava | sabato, 19 h. | Lidový dům Na kamenci. |
| Plzeň | sabato, 20 h. | Měšťanská beseda. |
| Praha | merkredo, 20 h. | kafejo Louvre, str. Národní 20. |
| Prostějov | jaŭdo, 20 h. | domo de Svaz ĉ. mládeže. |
| Tábor | mardo, 19 h. | hotelo Znamenaček, str. Stalinova. |

UNIVERSALA Kongreso (32-a) estos en Bern, 26a Julio — 2a Aŭgusto, 1947. Adreso: 32a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern, Svislando.

KONGRES-KOTIZOJ

| | Ĝis 31-12-46 | Ĝis 31-3-47 | Poste |
|---|--------------------|--------------------|--------------------|
| 1. Kongres-kotizo: svisaj frankoj aŭ ŝilingoj | 25,- 30/- | 30,- 35/- | 35,- 40/- |
| 2. Por la edzo aŭ edzimo de kongresano | sv. fr. 12 aŭ 15/- | sv. fr. 15 aŭ 18/- | sv. fr. 20 aŭ 24/- |
| 3. Por ĝejnuloj ne pli ol 20-jaraj | sv. fr. 10 aŭ 12/6 | sv. fr. 12 aŭ 15/- | sv. fr. 15 aŭ 18/- |

Aliĝilojn kaj pagojn oni sendu al la Kongreso laŭ la supra adreso, aŭ al Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Nia Asocio klopodas pri faciligoj por pasportoj.

MI, VI, ILI ONI RIDU, EĈ SE LA MOTIVO MANKAS!

Malico.

La perfekteco ne estas homa, kaj nenia homa kreaĵo estas absolute perfekta. Same la homa logiko ne estas perfekta, sekve nenia homa kreaĵo estas absolute logika. Ankaŭ Esperanto estas tia.

Mia amiko Maliculo tre trafe kapblas tion demonstri. Laŭ li kamparano ja ne estas homo: kampa rano estas besto! Kaj koturno ne estas besto: Ĝi ja estas urno por enmeti koton!

Mi faris al li gratulon pro la »genia« deduktkapablo; li indigne respondis, ke ke li neniam gratas, kaj sekve ne estas gratulo!

Kial mi respondus, ke li estas malŝaga ansero? Li ja rebatus, ke li ne estas ero de anso...

Kun Maliculo mi neniam plu diskutis. (Flandra Esperantisto, sept. 1946.)

Usonaj proverboj:

La mondo estas fotoaparato. Ridetu, mi petas!

La genio estas farata de kvarono da inspiro kaj tri kvaronoj da ŝvito.

Ne haltigu la plugilon por kapti la muson.

(Svisa espero, aprilo-majo 1946.)

Se via fraŭlino diris al vi, ke vi estas perfekta idioto, estu konsolo por vi, ke nenio en la mondo estas perfekta. (Dikobraz)

Atentu, atentu! Timiga informo! Tiuĵ ĉi komikaj ridigiloj estas la lastaj, kiujn ni prenas el presita materialo. De nun ni publikigos sole tiujn, kiujn esperantistoj elpensis! Do kamaradoj! Do samideanoj! Do verduloj! Ek al funkcio de inventistoj de spritajoj novaj! Esperantistoj taŭgas por ĉia ajn funkcio. Do jen!

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel, a nakladatel Svaz esperantistů ĈSR v Praze 47. Redaktor Dr. Stan. Kamarýt. Ročně 70 Kčs s členstvím. Bez členství 60 Kčs. Ti skem Jar. Strojila v Přerově. Účast na poštovní novinové službě povolena ředitelstvím pošt v Brně čís. jedn. IA-4-2370-0/37132 - 15. 3. 46. Dohlédací poštov. úřad Přerov 2.